

Protokolo de la 64a SAT-Amikara kongreso, okazinta en Paŭo inter la 11a kaj la 14a de aprilo 2009.

kompilita laŭ dumkunsidaj notoj kaptitaj de Vito Markovo k registraĵoj akiritaj dank' al Maksimiliano Gverino

Dimanĉomatena laborkunsido (9a-12a je 20090412) :

Gi' Kavaljero (Guy Cavalier) K-n°107 : Salutas. Malfermas la unuan kunsidon. Kunsid-prezidantoj : akceptintaj estas Jakvo Ŝram' (Schram) por la unua, Marcelo Redulezo por la dua.

Dominiko Simeono (Dominique Siméone) 117 : Legas salutvortojn de Julieto Ternanto (Juliette Ternant) :

"Saluton al la kongreso

"Kun plezuro mi salutas tiun 64an SAT-Amikaran kongreson.

"Multaj ŝanĝiĝoj okazis en nia asocio tiujn lastajn jarojn. El la plej aktivaj membroj, kelkaj forlasis siajn aktivaĵojn (aliaj la asocion), ĉu pro maljuniĝo, ĉu pro aliaj motivoj. Sed novaj fortoj prenis la torĉon kaj SAT-Amikaro daŭrigas sian vojon.

"La OKK de ĉi-tiu kongreso multe laboris, klopodis, por, kiel eble plej, agrabligi tiujn kongresajn tagojn per organizado de prelegoj, ekskursoj, artaj aranĝoj...

"Dezirinde estas, ke ĉiuj partoprenantoj ĝuu feliĉan restadon kaj ĉefe, ke la kongresaj laboroj estu plenefikaj favore al SAT-Amikaro kaj al SAT.

"BONAN KONGRESON AL ĈIUJ ! Juliette Ternant"

Demandas ĉu estas pliaj salutoj.

Terez' Pinet' (Thérèse Pinet) 34 : Salutas nome de la fervojistoj. En Triesto maje okazos la internacia fervojista kongreso. Tre amika etoso.

GK 107 : Nome de Radio-Esperanto en Parizo k Pacista Unuiĝo.

Serĝo Sir' 1 : Nome de Kvinpetalo.

Jakvo Ŝram' 62 : Nome de SAT, reprezentante la Plenum-Komitaton. Substrekas ligitcon de LEA-oj kun SAT. Ankaŭ tie okazis ŝanĝoj. Kreŝo Barkoviĉ' emeritiĝis. SAT bezonas membrojn k subtenantojn.

Legas la agadraporton kiu aperis en La Sago de marto 2009 k demandas pri eventualaj komentoj/demandoj post ĉiu raportero.

Komitato : neniuj rimarkoj

Libroservo :

Veroniko Ĵirar' (Véronique Girard) 10 : Eldoniĝis ĵus, aprile 2009, Kiel traduki... de Andreo Andrio kun ilustraĵoj de Seĝo Sir' (enpaĝigis Serĝo Sir') k Jules Verne Espérantiste de Lionelo Dupŭio (Lionel Dupuy) tradukita de Armela' LeKvint' (Armelle LeQuint) k Ĵak' LePuil', enpaĝigita de Frederiko Scibor'.

Kongreso :

Aplaŭdoj por la OKK de Paŭo.

La Sago :

Aplaŭdoj por la skipo.

Perkorespondaj kursoj : neniuj rimarkoj

SAT-Amikaro en Belgio :

Klementino Staketo 52 : Opinias ke venas la tempo kiam oni povas simpligi la mendojn. Komuna valuto por Francio k Belgio. Do Belgianoj povas mendi k pagi rekte tra Parizo. Rolo de Klementino plu estu simple diskonigi la riĉecon de la libroservo.

F.E.I. :

Luceto Eçapeo (Lucette Echappé) 78 : Kio estas FEI ?

GK 107 : Franca Esperanto-Instituto.

Gi' Marteno (Guy Martin) 17 : Ĉu iu FEI-SAT-Amikarano povas raporti ?

Vinko Markovo 20 : Klarigas kiuj estas la 5 SAT-Amikaranaj delegitoj en FEI : Serĝo Sir', Ĵak' LePuil', Klaŭdo Ĝerlato (Claude Gerlat), Klaŭdo Rukso (Claude Roux) k Vinko Markovo. Krome 7 delegitoj de UFE k 3 pliaj elektitaj de la 12 unuaj. 4 ekzamenitoj ĉiuj sukcesaj pri la unua grado ĉi kongrese. Relative malmulte da kandidatoj do. Substrekas ke necesas puŝi la lernantojn al ekzamenoj cele al plialtigo de la lingvonivelo. En FEI ĉi jare estis enkondukita plia sesio por la tria grado pri scienca k faka tradukado sed praktike ĝis nun ne elprovita. La ideo estas ke ne nur literaturaj kapabloj estu ekzameneblaj sed ankaŭ teknikaj. Nuna problemo de FEI estas la retejo ĉar ne sufiĉe ĝisdatigita pro akumulado de mandatoj kiu rezuligas superŝutecon.

SS 1 : Laŭmodas Eŭropa ReferencKadro. Iuj FEI-anoj dezirus adapti FEI-on por kongrui ĝin kun tiu RK. Persona ege malfavora al tio. Ŝatus ke SAT-Amikaro havu opinion pri ĝi. En La Sago estis provite vekti debaton pri tio, vane ĝis nun.

VM 20 : Kial ĝi esta tikla ? Eŭropskala niveligo 'pli-malplia' inter la aliaj landoj. Ŝajnas ke temas ĉefe pri krude lingvotekniko k ne pri kulturo. En SAT-Amikaro, la delegitoj defendis gravecon de kulturo (lingvohistorio, ktp) en kadro de FEI.

Johan-Seb' Brio (Jean-Sébastien Brilleau) 138 : Ĉu estas debato pri tiu temo dum la kongreso ?

Ansofi' Markovo (Anne-Sophie Markov) 19 : Apoge al atento pri la kultura flanko. Pensas ke eblas havi por la ekstera mondo valorajn ekzamenojn konservante proprajn kriteriojn por ekzamenado k altnivelan kulturindtruadon.

JSB 138 : Opinias la RK-on tre bona por esperanto ĉar ebligas niveliĝi : A : komencantoj, B : kapablo diskuti, C : kapablo esprimi sentojn. K montri ke per esperanto estas pli rapide atingi altan nivelon.

TP 34 : En la asocioj estas membroj lingve ege bonaj sed kiuj trapasis neniun ekzamenon. En FEI ŝi estis kasisto dum multaj jaroj. Ĉefa ekzistokialo estu kuraĝigi la lernantojn diligente k ĝisfunde lerni. ILEI estas la internacia ekzamenista movado k havas influon en tiu afero de RK.

SS 1 : Volas rebati al k-do 138. RK estas kvazaŭ 'pulvoro en la okuloj'. La ekzamen-kriterioj estas nebulaj. Estas demandoj sed ne antaŭviditaj respondoj. La sukceso dependas de la jurio. Se rigora, neniuj sukcesos, se malrigora, ĉiu sukcesos. Titoloj malplenaj.

VM 20 : La RK fakte ne estas ekzameno sed maniero taksi akiritan nivelon.

Jorgos' Komto (Jorgos Comte) 23 : Ne pedagogo. Sin demandas kiel ekzemple la franclingvaj landoj (Francio, Belgio) adaptiĝis al la RK. FEI ne restu en sia angulo.

JSB 138 : Rebatas al k-do 1. Pensas ke li karikaturas la aferon. RK estas pli ol tio. Ekzistas aŭtomataj komputiloj por fari la ekzamenon. Ebleco per RK rebati al la anglalingvistoj. Montri ke la ekzameno de la anglalingvanoj estos plejparte malsukcesaj ĉe ekzameno B k C dum esperantlingvanoj estos tie sukcesaj. Do varba celo antaŭ vasta publiko.

SS 1 : Celo do estas varbadi, montri ke Eo estas taŭga internacia lingvo, funkcias ktp. Bone, sed jam ekzistas multaj aliaj manieroj atingi tion. Kritikas la malseriozecon de la pedagogia flanko.

Ĵak' LePuil' 13 : Volas resumi. FEI ekzistas depost la 2a mondmilito. De kelkaj jaroj UFE-anoj deziras esti respektataj de homoj, kiuj neniam respektis nin (t.e. gravuloj, politikuloj, ktp). Do ni perdas tempon.

JSB 138 : Rediras ke estas rimedo reklami por esperanto.

AM 19 : Necesas prikonsideri tiun kadron sed atenti ke la FEI-ekzamenoj ne suferu pro tio. Do ne utilas komplete forĵeti sed atingi iun eblecon kontentigi ĉiujn.

GM 17 : Komprenis ke temas pri privata afero, k ne senpaga (eĉ kosta). Parolis kun Katalin' Kovac' pri tio. Ĉu iu povas konfirmi/malkonfirmi tion ?

TP 34 : Ankaŭ la internaciaj ekzamenoj estas tre kostaj.

VM 20 : Reprecizigas, ke kongreso eble ne refaru debaton, kiu jam okazis. FEI decidis nur indiki, ke la FEI-ekzamenoj almenaŭ ekvivalentas k eĉ superas la RK-on. Kongreso eventuale aprobu/malaprobu tiun decidon. Nur komparilo, ne kadro por ekzamenoj. Pri kosto ne povas respondi precize.

La Bellevilloise : neni rimarko

E-lernantoj en Afriko :

VĴ 10 : Ne havas la teskton sed memoras. Ĵan-Ivo Santero (Jean-Yves Santerre) plu faras la solidar-sendadon sed havis problemojn lastajn jarojn pro administraj malfacilaĵoj pro multkosteco de la sendoj. Ĉi jare reebliis al li rehavi la avantaĝan sendokoston. Estu li dankata, same kiel Gi' Marteno kiu helpis lin.

Konkludo : neni rimarko

Financa raporto : Kompleta bilanco preparita de la kasisto konsultebblas laŭpete. Jakvo legas la kasraporton el La Sago de marto 2009.

Paŭlo Branko (Paulo Branco) 95 : Ĉu eblas ke Bât I Gambetta k Bât II Vincent Auriol estas tiel malaltvaloraj ? Ĉu estas kaŝita riĉeco ?

GK 107 : Demandos Andreon, la kasisto.

VM 20 : Ŝajnas ke temas simple pri la aĉetprezoj.

GM 17 : Profitas la okazon varbi al la klerigesio pri asocia kontado okazonta lunde ptm. Konfirmas la diron de Vinko, ke la prezoj indikataj respondas al la aĉetprezo en la epoko kiam la domoj estis akiritaj de SAT-Amikaro.

JŜ 62 : Substrekas bonvolemon de la kasisto, kiu strebas prezenti kiel eble kompreneblajn kontojn. Prefere kontakti rekte kun la kasisto kiam estas preciza demando.

JŜ 62 : Kion ni faru nun. Ĉu danci ?

GK 107 : Ĉu eble Terez' rakontu pri referendumo ?

TP 34 : Ĉu vere necesas ? Sekvas babilado, laŭdado de la agadantoj, inter alie tiuj kiuj bonege organizas ĉi tiun kongreson. Programo tre riĉa. Relegas ciferojn el sia raporto pri la referendumo en LS 53 (marto 2009). Plenigas la tempon... Komentas...

Maksimiliano Gverino 45 : Pri delegito. Invitas la homojn veni al la posttagmeza kunveno pri delegitoj. Necesas plu precizigi ilian rolon.

GM 17 : Memorigas ke lastjare li malaprobis la kontojn sed volas nun danki al Andreo Sadiero (André Sadier, la kasisto) kun kiu li zorge diskutis k kiu bonvoleme klarigis.

SS 1 : Problemo de La Sago estas la franclingvaj paĝoj, por kiuj kontribuoj mankas. Necesas respondeculo. Se ne la koncernaj paĝoj malaperos. La membroj havos la revuon, kiun ili meritas.

TP 34 : Eble Johan'-Luko Tortel' (Jean-Luc Tortel) povas proponi sian kurson "Eo per proverboj" por felietona aperigo en la franclingva suplemento de La Sago

Marcelo Redulezo 3 : Apogas la diron de Gi'. Ĉi jare la unuan fojon el 20 jaroj li ekscias, kiom riĉa estas SAT-Amikaro. Petas alpaŭdon por Andreo, tre honesta k diligenta kasisto.

Voĉdonado pri la bilanco : Por= neta plimulto, Kontraŭ= neni, Sindetenoj= 3. Financa bilanco aprobata de la kongreso.

VĴ 10 : Libroservo. Materialo aĉetita dum la jaro (ŝrankoj, komputilaĵoj). Pri mendokostoj por grandaj mendoj fakte Veroniko ne pagigas 20%-ojn sed la realan koston, sed restu tio en La Sago. Iuj petis kiel rekte mendi ĉe la

libroservo. La informoj troviĝas en la libroserva rubriko de La Sago. Pri transportado de la libroj al la kongreso : multaj Pariz-regionanoj partoprenis k helpis, ĝi estis transportita en 4 diversaj aŭtoj. Dankon al la kunhelpintoj.

JŜ 62 : Proponas voĉdonadon pri la agadraporto : Jes= neta plejmulto, Kontraŭ= neniu, Sindeteno= neniu. Raporto aprobita.

JŜ 62 : Fermas la kunsidon k invitas iri al grupfotado (sub la pluvo !). K al la posttagmezaj kongreseroj.

Dimanĉoposttagmeza laborkunsido : laborgrupoj (resume raportitaj dum la lunda laborkunsido)

Lunda laborkunsido (9a-12a je 20090413) :

Prezidas Marcelo Redulezo.

MR 3 : Bonvolu permesi al mi komenci nian duan laborkunsidon per emociiga antaŭparolo.

Antaŭ dek tagoj tragike trafikakcidente mortis Samir, dudekjara esperantisto, filo de nia kamaradino Marielen Desert-Sautet.

Lastan merkredon en la preĝejo de la ĝirondia vilaĝo St-Avit St-Nazaire, kiu situas ĉe la limo de la departemento Dordonjo sur vojo de Bordojo al Berĝerako, okazis nekutima ceremonio, kiu kunigis ĉirkaŭ samaj sentoj plej diversajn kredojn religiemajn aŭ ne. Omaĝo al talentoplena junulo far proksimumoj, samaĝuloj, samvilaĝanoj, muzikantoj, kaj multaj aliaj, krom kelkaj esperantistoj.

La salutvortojn al Samir reliefigis popoltradiciaj, barokaj kaj modernaj muzikoj kaj kantoj.

Marielen, nia kamaradino kronis la tuton per vortoj kaj sinteno elmontrantaj sian firman kredon en la homa vivo. Homa vivo riĉa je amo kaj muziko.

Antaŭ du jaroj, SAT-Amikaro kongresis en Artigo ĉe Bordojo. Tie, tiam SAT-Amikoj plezure ĝuis kaj aplaudis la barokan muzikgrupon de Marielen. Tiam, tie majstre gitarludis por ni Samir.

Hodiaŭ mi dezirus ke la paŭa kongreso plu aplaudu !

Tagordo : komitato 2010 ; raporto pri laborgrupoj, prezento de projekto pri filmo, prezento de la SAT-kongreso en Milano, prezento de la estontaj kongresurboj.

Komitato 2009 estas : Fil' Giĉeto (Phil Guichet) Maksimiliano Gverino (Maximilien Guérin) Veroniko Ĵirar' (Véronique Girard) Gi' Kavaljero (Guy Cavalier) Vito Markovo (Vito Markov) Terez' Pinet' (Thérèse Pinet) Andreo Sadier' (André Sadier) Dominiko Simeono (Dominique Siméone)

Listo de kandidatoj por komitato 2010 : Fil' Giĉeto (Phil Guichet) Maksimiliano Gverino (Maximilien Guérin) Veroniko Ĵirar' (Véronique Girard) Gi' Kavaljero (Guy Cavalier) Vito Markovo (Vito Markov) Gi' Marteno (Guy Martin) Dominiko Simeono (Dominique Siméone)

GK 107 : Andreo deziras « emeritiĝi ». Gi' Marteno konsentas anstataŭi lin kiel kasiston. Ankaŭ Terez' Pinet' ne rekandidatos, sen anstataŭanto. Estos nur sep membroj do en 2010.

MR 3 : Kiel nekomitatano dankas al la komitato pro ĝia agado.

Raporto pri laborgrupo : La Sago k delegitoj (20-o da homoj ĉeestis)

SS 1 : Temis pri la franclingva suplemento, tre postulata de multaj membroj, sed malabunde nutrata. Jam lastajre la provo difini kiucele ni redaktu ĝin ne tre bone funkciis. Por ĵurnalistoj klare nun ĝi estas preksaŭ senutila. Aliaj deziras ke ĝi utilu al komencantoj. Sed por komencantoj legi francan lingvon eble ne estas plej taŭge. Rubriko « Esperantistoj aktivis » povus ŝoviĝi franclingve en tiuj paĝoj. Ebleco ankaŭ traduki el ekzemple Sennaciulo, sed por tio necesas tradukantoj. Iuj menciis pri dulingvaj tekstoj, kies varbefikecon oni povas ankaŭ pridubi. Alia solvo estas ankaŭ krei mallongajn facillingvajn tekstojn cele al komencantoj. Proponite ankaŭ estis kunlaboro inter UFE k

SAT-Amikaro, kiuj ambaŭ havas similan rubrikon pri movadnovaĵoj, gazeteltondaĵoj, ktp. Petas kiu pretas esti korespondanto por la Sago pri tiuj paĝoj. Eĉ neesperantistoj povas kunlabori por tiuj franclingvaj paĝoj.

TP 43 : Donos al Serĝo la kontaktojn de k-doj tradukpretaj laŭ la referendumo.

GK 107 : Meti alvokon en la gazeto.

SS 1 : Ŝerce diras, ke li pretas eĉ lasi blankajn paĝojn kun nura mencio : « Metu ĉi tien vian artikolon »...

JK 23 : Por komencantoj, rubriko « demandoj/respondoj » kiuj povus esti ĉu en esperanto, ĉu en la franca. Ekzemple demandoj pri kio estas SAT-Amikaro...

Terez' P. : Johan'-Luko Tortelo (Jean-Luc Tortel) prilaboris esperanto-kurson per proverboj kiu povus aperi en la suplemento.

VM 21 : Jo-Luko sendis al mi du lecionojn de L'espéranto par les proverbes...

TP 43 : Temas nek pri L'espéranto par les proverbes nek pri La Leciono, sed pri io alia.

SS 1 : Do li sendu kaj ni vidos !

SS 1 : Konkrete rondirigas folion por kapti kontaktadresojn de homoj pretaj kunlabori por nutrado de la franclingva suplemento.

JK 23 : Gravus anonci kio okazos (k ne nur kio okazis).

MR 3 : Ni transiru al la parto pri delegitoj. Precizigas ke ne temas refari la laborgrupon, sed koncize raporti !

MG 45 : Delegitoreto ne vere funkciis plenkontentige lastjare pro malpreciza difino de la roloj ligitaj al ĝi. Rememorigas la eblajn rolojn plenumebajn de regionaj delegitoj. (listo estas en La Sago 53 de marto, p.15) Emfazas ke ne estas strikte difinita la roloj ĝuste por ke la delegitoj povus fari kion ili povas sen senti premon pro devigaj taskoj. Gravus kapabli dividi la taskojn k kunlaborigi la aliajn, notinde lokulojn. Rondirigas folion por kapti kontaktadresojn de interesatoj. Gravegas scii precize k ĝisdate anonci ĉiujn kursojn.

TP 43 : Pri kursoj, rimarkigas ke eblas utiligi la referendumilon por tio.

MG 45 : Kursoanoncoj estas konstante ĝisdatigendaj. Kunlaboro pri tio tute eblas k indas kun UFE.

GM 17 : Tute bone komprenas tion, k atentigas ke la mapo en retejo de Eo-Fr ne estas bone ĝisdatigita.

Aleks' Kadar' (Alex Kadar) 132 : Ne de Eo-Fr, sed Eo-panorama.

Raporto pri la laborgrupo pri varbado (20-o da homoj ĉeestis).

VM 20 : La laboro pri ĝisdatigo de ĝi estas envojigita (korekto proponoj listigitaj). Tiu de 2007, 4000-ekzemplere eldonita, elĉerpita nun. Antaŭvidi la eldonnombrojn per informiĝo antaŭe ĉe lokaj grupoj por scii kiom ili pretas mendi. Estis demando ĉu revenis plenigitaj flufolioj al la sidejo. Alia punkto levita pri aliĝfolio por SAT-Amikaro. Ne tre sukcese... Ankaŭ aludita estas la projekto pri rebako de varbbroŝuro SAT-Amikara por franclingvanoj. Plu pendanta projekto... Rondirigas flugfoliojn por kapti pliajn adresojn de homoj pretaj labori pri tio.

TP 43 : Mencias ke plu disdonadas la laŭtemaj slipoj redaktitaj siatempe de Henriko Masono (Henri Masson). Baldaŭ ankaŭ ili estos elĉerpitaj.

AM 19 : Emfazas pri graveco surporti insignojn.

Grava projekto laŭ ideo de Frederiko Scibor' (Frédéric Scibor) estas dokument-filmo pri esperanto.

VM 20 : SAT-Am havas monon investindan. Tiu projekto, de SAT-EFK (eldonkooperativo de SAT), bezonas ĝuste gravan subvencion ĉar buĝeto estus ĉ. kvindek mil eŭroj, kion SAT-Am kapablas certigi. Inkluzivus vojaĝon al UK jubilea en Bjalistoko. Ne temas pri duoblaĵo de DVD « Eo estas », kiu estas propagandaĵo pri « lernu esperanton ĉar ĝi estas ege bona lingvo », sed 52-minuta filmo realigota de profesiulo, dokumenta sed neniel prozelita. Ĝi estus kun multlingvaj subtitoloj k plurlingve dublita. Estus filmo de reĝisoro neesperantista, kiu filmos la realon de la nuna e-movado, kun kompreneble superrigardo de la esperantista grupeto kiu zorgos pri la projekto. Vendokosto

unuopa estus ĉ. 18-20 eŭroj.

AK 132 : Tre bona projekto. Rapide kalkulis ke necesus 2500 unuopaj vendoj por rekapti la 50000 eŭrojn investitajn. Kiel prezenti ion neŭtralecan se la financanto estas iu eo-strukturo ? Kiel oni povas kredigi ke la filmo estas neŭtrala se la financisto estas e-strukturo ?

AM 19 : Ne pretendas esti neŭtrala la projekto, ĉar malkaŝe projekto de SAT/SAT-Amikaro.

VM 20 : Pravas Aleks', klare neŭtraleco absoluta ne eblas, k la projekto estas klare SAT-eca. Sed ĝuste SAT celas ne varbi al esperanto, sed helpi homojn racie k memstare pensi, sin apogante sur analizo de faktoj. Do la filmo, dokument-filmo de neesperantista reĝisoro, estos ilo por homoj informiĝi pri esperanto, instigante ilin poste mem plu informiĝi, se tion ili taksas inda. Ebligi al homoj baziĝi sur faktoj, jen la ideo.

MR 3 : Komparas kun sciencistoj kiuj laŭdas nutraĵojn produktitajn de kontrakte ligitajn strukturoj. Por konsciigi ke eble oni devos fronti

JSB 138 : Kial ne fari biografian romanecan filmon pri Z aŭ Lanti' ? Komparas kun la filmo « El coche de pedales » en kiu la emocio tra aktoroj estas efika por komprenigi al la spektantoj kiel oni povas konsideri esperanton.

VM 21 : Ĝuste la celo estas ne sin apogi sur emocioj, sed male liveri faktojn, sen aldoni sian vidpunkton. Poste la spektanto mem faros al si opinion.

SS 1 : Buĝeto por romaneca filmo kun aktoroj estos multe pli kosta. Eblas enmeti sentojn en dokument-filmo.

VM 20 : Jes, dekoble pli kosta almenaŭ, do simple ne eblas ! Aliflanke emocio ne disigebla de homeco, do SAT estas klare raciema, sed ne eblas komplete forlasi la emocian flankon en homa realigaĵo.

GK 107 : Malfacilo estas fari ion kiu ne rapide iĝos malaktuala.

JK 23 : Gratulas pri la tre bona ideo. Levas ideon ricevi subvencion de ekzemple televidkanalo « Canal+ » aŭ « TV5 ».

VM 20 : Atentigas pri juraj respondecoj, ke subvencioj supozigas malkaŝe montri la kontojn de la asocio, ke li, kiel jura prezidanto de SAT-EFK irus malliberejn en kazo de problemo... Subvencioj jam antaŭviditaj sed ne eniras la buĝeton.

MR 3 : Petas ĉu estas kontraŭantoj al la projekto. Neniu. Ŝatus do ke la kongreso voĉdonu por esprimi sian apogon al la projekto, tiel ke la projekto povos antaŭiri tuj kiam praktike eblos (kiam la reĝisoro estos trovita.

TP 43 : Tamen esti singarda pri la elspezo, ne temas pri bagatela sumo.

Ĵanino Dumuleno (Janine Dumoulin) 51 : Ĉu eblos al grupoj antaŭmendi por helpi financadon ?

VM 20 : Jes tio estas antaŭvidita. Samkiel rekonsidero de la projekto se buĝeto eksplodas kompare al tiu antaŭvidita.

GM 17 : Neceso regule informi pri la antaŭeniĝo de la projekto pere de La Sago. Demandas pri datoj (kiam ekas, kiom longe daŭros ĝis fini la projekton... ?) ; certe necesos starigi kalendaron pri la etapoj de realigo de la projekto.

VM 20 : Celo estas filmi jam ĉi somere en jubilea UK, k en somero 2010 jam povi disvendi en UK k SAT-kongreso. Sed tio dependas ankaŭ de la disponebleco de la reĝisoro k la skipo. Necesas kompreneble ke skipo dekomence k ĝisfine sekvu deproksime la aferon.

MR 3 : Voĉdonigas pri : Kongreso subtenas ke SAT-Amikaro finance subtenos la projekton de SAT-EFK fari profesion dokument-filmon pri Esperanto. Ĉiesvoĉe k aplaŭde aprobite !

Transiras al tagordo pri la venonta SAT-kongreso en Milano 2009/07/18-25.

JŜ 62 : Juna skipo ankaŭ tie. Serioze organizita kongreso. Informoj ĉerpeblaj el la SAT-retejo. Aliĝilaj paperoj disponeblaj ĉi tie. Grave ke estas kongreso kunorganizita kunlabore kun kultura progresema asocio ARCI (kun miloj da membroj), kiu havas esperanto-sekcion, ARCI-esperanto, per kiu la kongreso estas organizita. Do

sendube estos do tre riĉa kultura programo, notinde ekskursi. SAT-Amikaraj kongresoj en lastaj jaroj estas kvante pli sukcesaj ol la SAT-aj. Li instigas do al amasa partoprenado al Milana kongreso. Sekvas plene jakveca prelegeto pri kiel bona k riĉiga asocio estas SAT nun, post tre pozitiva evoluo de 20 jaroj. Daŭre laborista asocio, kie homoj debatas k reciproke klerigas unu la alian per serena interŝanĝo de spertoj k opinioj k komparo de faktoj. K, inspirite de Dio (estas Pasko, ĉu ne), li laŭdas la belecon de preĝejoj milanaj. Konklude : se vi povas, aliĝu al SAT k aliĝu al SAT-kongreso 2009 en Milano.

VM 20 : Aldonas pri la programo, ke turisma parto ne estas neglektita, k ke informojn pri tio povos doni Karlo Burlot' (Carlo Burlot). Pozitiva evoluo de SAT verŝajne ankaŭ grandparte fontas el tiu rigora strebo disigi priasociajn k ĝeneralpolitikajn diskutojn, ambaŭ tre gravaj se prefere disigindaj por eviti devojiĝojn k certigi efikecon en la agado. Do konkrete en SAT-kongreso estas priasociaj partoj matene (laborkunsidoj) k ptm prelego-debatoj (15 min da prezento k 45 da interŝanĝo) k klerigsesioj pri ĉiaj SAT-ecaj temoj eblaj. Ĉi jare verŝajne estos io pri Madagaskaro, sociaj movadoj en francaj Kariboj...

JŜ 62 : Substrekas komplementecon de li, emociema kiu sin apogas sur sentoj, k Vinko, raciema, kiu argumentas per faktoj. Bone funkcia duopo.

MR 3 : Transiras al punkto pri venontaj SAT-Amikaraj kongresoj.

GK 107 : Propono de Gizelo Miĉaudo (Gisèle Michaud) en Granvilo (Granville). Teknike la strukturoj ekzistas, mankas nur iom da homforto por realigi. Propono ankaŭ de Johano Henin' (SAT-Amikarano k UFE-ano) pri interasocia renkontiĝo en Langvedoko-Rusiljono.

Johan-Francisko Pasarella' (Jean-François Passarella) 8 : Tio estus en 2011, organizota de la regiona Federacio. Ĝiaj membroj plejmulte apartenas al neniu el UFE k SAT-Amikaro. Antaŭvidas multnombrian kongreson kun ĉ. 300 homoj. Bezonas por la organizado respondon nepre antaŭ la 30a de junio, ĉu SAT-Amikaro konsentas pri tiu komuna renkontiĝo, kiu kompreneble ne estus komuna kongreso, sed ebligu al homoj kongresi samloke k samtempe. Ĉeestis ĉi jare sian unuan SAT-Am-kongreson. Tre kontentas pri la etoso. Gratulegas ankaŭ nome de la federacio (16 federacianoj partoprenas la kongreson) pri la brila OKK-laboro.

TP 43 : Ne forgesu inviti la fervojistojn.

JFP 8 : Jam invititaj k ili akceptis !

JK 23 : Substrekas ke estas fidindaj homoj en Langvedoko-Rusiljono, kiuj tre sukcese kunorganizis la UK-on en Montpeliero en 2008.

MR 3 : Petas ĉu la ĉeestantoj ŝatis la sperton de Bulonjo, k do subtenus rean similan aranĝon.

AM 19 : Plaĉas renkontiĝi multope dum aranĝo, sed tio estas malprofita por la unuopa asocia laboro. Bulonjon ĝenerale ŝatis, sed laŭ SAT-Amikara vidpunkto tute fuŝa. Ne eblas kongresi plurope, praktike.

ĴLP 13 : Preskaŭ entute aprobas la diron de Ansofi'. Mem estas membro de ambaŭ asocioj. Substrekas, ke estas pli problema por SAT-amikaro ol por UFE fari komunan renkontiĝon, ĉar e-etoso certe estos, sed SAT-etoso nepre suferas.

SS 1 : En Bulonjo kelkajn programerojn ege malŝatis pri etoso, ekzemple kiam devis elteni la Marseljezon...

JK 23 : Antaŭvidas, ke povus esti semajna festivalo, kun pluraj asociaj kongresoj ne samtempe, sed sinsekve.

JFP 8 : Atentigas, ke por 2011 proponas maksimume 5-tagan programon. Pri la programo, ĝi estu farita de ĉiuj asocioj kune. Indikas, ke eblas ne refari la misaĝojn kiuj okazis en Bulonjo. Pri konfliktoj de samtempaj kongreseroj, rimarkigas ke eĉ dum unuasocia kongreso kiel tiu ĉi de SAT-Amikaro, ne eblas ĉion ĉeesti k nepre oni devas fari elektojn.

AM 19 : La turismaj partoj k kulturaj vesperoj povas esti organizitaj kune, k la laborkunsidoj estas prizorgitaj de la asocioj mem, sed dum nekonkurenca tempo.

MR 3 : Celu de nuna diskuto estas doni gvidlinion al la komitato por helpi ĝin respondi antaŭ la 30a de junio.

GK 107 : Estis jubileo en 2005, pro tio tiom da homoj. En 1011 ne estos same.

MR 3 : Memoras, ke en Bulonjo li promesis kunorganizi interasocian renkontiĝon en 2021 okaze de SAT-centjariĝa jubileo.

AM 19 : Bedaŭrinde en Bulonjo estis limigita la kongresankvanto je 500 homoj.

JŜ 62 : Pro li Bulonja SAT-Amikara kongreso esti lia plej malbona SAT-Amikara kongreso. Memorigas pri la malagrabra sperto pri kunfandiĝo en FEL de neŭtrala k SAT-eca movadoj. Rakontas kelkajn malgrablajn spertojn pri neglata kunlaboro inter neŭtrala k labortista e-movadoj. En Bulonjo eĉ mankis kunvensalono por SAT-Amikara laborkunsido. Bedaŭras ke lia 20-jara sperto de esperantisto estas ke en komunaj aranĝoj SAT-movado estas flankenmetita. Sed ne malesperas pri pozitiva kunagado.

VM 20 : Utilas kompari, sed noti ankaŭ ke SAT-Amikaro nun ne estas samfarta kiel FLE en tempo de kunfandiĝo. Pri SAT-Am-kongreso 2006, diras ke li malkontentis pri la kongreso kvankam ĝi estis nur SAT-Amikara. Konkrete por 2011, nepre SAT-Amikaro havu eblecon certiĝi, ke la kongresregularo SAT-Amikara estos respektita, kio certigos SAT-ecan etoson (ekzemple pri malmultekosta loĝebleco).

Ĝilberto Darieŭzo (Gilbert Darrieŭ) 5 : Ŝatas de tempo al tempo havi komunan renkontiĝon.

JFP 8 : Rediras, ke antaŭ 30a de junio li atendas ne nur jes/ne-respondon, sed kondiĉojn de akcepto.

ĴLP 13 : Supozas ke estos samtempaj laborkunsidoj de ekzemple SAT-Amikaro k UFE, k ĉar li membras ambaŭ asociojn, li ne povos ĉeesti ambaŭ kongreson !

Marcelo : Reiras al la venontjara kongreso en 2010.

Gi' Marteno : Komprenis ke en Granvilo la proponinto (Ĝizelo Miĉaŭdo, preskaŭ 90-jara) pretas akcepti, sed ne kapablas homforte organizi. Proponas, ke eble la Bretonanoj povas helpi la OKK-on.

JK 23 : Substrekas, ke eblas profiti el la sperto de organizintoj pri la kongreso en Kvintino (Quintin) k Heruvilo-San-Klaro (Hérouville-Saint-Clair, SAT-Amikara Kong. 1993).

Karl(aĉ)o Burlot' 90, OKK-ano, pri la milana SAT-kongreso : Kunportis kelkajn aliĝilojn. La periodo ne estas plej taŭga sed aliel ne eblis. Pri turisma programo, vidu interne de la aliĝilo !

MR 3 : Tagordo finatingita, ĉu demandoj ?

GM 17 : salutas nome de Rozika' Todor' (Rosica Todor) el Rumanio, kiu intencis partopreni la kongreson sed ne povis. Ŝi ŝatus esplori iam organizi SAT-Kongreson en Rumanio. Kiel komitatano de Greziljono ankaŭ proponas diskuti kun interesatoj pri la estonto de Greziljono post la laborkunsido.

MR 3 : Fermas la kunsidon per varma aplaŭdo al la diligentaj OKK-anoj, kiuj sukcese organizis en mallonga tempo la kongreson k ne ĉeestas nun la salonon ĉar preparas la tagmanĝon.